

KOMPLETIGOJ KAJ PERFEKTIGOJ DE LA TERMINARO
PRI LA EKSTERA MORFOLOGIO DE LA
FLORHAVAJ PLANTOJ
LAŬ NOTAĴOJ DE ĜIA AŬTORO

G. F. MAKKINK

En Scienca Revuo 10 2 - 35 Chr. F. W. S l i j p e r publikigis terminaron pri la ekstera morfologio de la florphavaj plantoj. En novembro 1959 sinjoro S l i j p e r mortis pro malsano en la aĝo de 74 jaroj. Li post-lasis inter aliaj du ekzemplerojn de la koncerna kajero de Scienca Revuo kun korektaĵoj de preseraroj kaj kun perfektigoj kaj kompletigoj. Ilin mi donas ĉi sube, escepte la malgravajn korektojn de interpunkcio. La numeroj indikas la samajn de la terminaro.

- 37 a Forstreku: „*arbedo* aŭ”.
Aldonu ĉe la fino: „*Syringa* L”.
- 42 i Anstataŭigu „*spirale*” per „*helice*”.
- 46 Anstataŭigu „*radikoj*” per „*radiko*”.
- 49 Anstataŭigu „*Kromradiko*” per „*Kromradikoj*”.
- a Anstataŭigu „*fibreska*” per „*fibreskaj*”, „*maldika*” per „*mal-dikaj*”, „*multnombra*” per „*multnombraj*”.
- b Anstataŭigu „*aeroradiko*” per „*aeroradikoj*”.
- Rim. 1 Anstataŭigu la nomon „*Spiraea filipendula* L., *Ulmaria* fil. J. Hill”. per „*Filipendula hexapetala* Gilib”.
- Aldonu post rimarko 2:
„3. *spirradikoj* (pneumatophora)”.
- „4. *naĝ-* aŭ *flosradikoj*, *Jussieua repens* L”.
- 51 Anstataŭigu „*laŭ*” per „*Laŭ*”.
- 55 Ŝanĝu en linio 4 „42” al „41”.
- 61 Aldonu „b” antaŭ „*foliodorno*”.
- 63 d Anstataŭigu „*urtikharoj*” per „*urtik-* aŭ *brulumharoj*”.
- 67 a En linio 3 kursivigu: „*flankaksojn duarangajn*”.
- 69 a Forstreku en la 2a linio: „*portas finstaran floron kaj*”.
- Aldonu en la 3a linio post „*ĉefakso*”: „*Kaj la ĉefakso kaj la flankaksoj portas nur unu, finstaran floron*”.
- En la 5a linio aldonu post „*k.t.p.*”: „*Tia floraro nomiĝas kimo,*”
- 70 Aldonu antaŭ „*decentrokuraj*”: „*Kimoj* aŭ”.
- 72 II a Kursivigu en linio 2 la vorton „*subspikoj*”.
- 90 a Kursivigu la vortojn „*verda*” kaj „*verdeska*” kaj aldonu antaŭ „*verda*”: „*nome:*”.
- b Aldonu antaŭ „*kolorhava*”: „*t.e.*”.

- 107 Anstataŭigu en linio 6 la vorton „*duobligo*” per „*duobliĝo*”.
- 121 a Anstataŭigu la terminon „*apotropa*” per „*sublokita*”,
b „*epitropa*” per „*surlokita*”,
c „*heterotropa*” per „*mikslokita*”.
- 131 e „*devanante*” devas esti „*devenante*”.
- h linio 2: „136” devas esti „138”.
- 140 a Aldonu: „; *Taxus* Trn., *Nymphaea* Sm.”.
- b „*stropholia*” devas esti „*strophiola*”. Aldonu: „; *Colchicum* Trn., *Viola* L.”.
- 141 Kursivigu la vorton „*semerhaŭto*”.
- 142 a Aldonu: „; *Euphorbia* L., *Ricinus* L.”.
- b Aldonu: „; *Evonymus* L.”.

Aldona Demando:

Laŭ P. V., W a r i n g h i e n (*Grand Dictionnaire Espéranto-Français*), W ü s t e r (*Enciklopedia Vortaro*), F u l c h e r & L o n g (*English-Esperanto Dictionary*) „*kompozitoj*” estas la nomo de la plantofamilio kiun S l i j p e r nomas „*kompozacoj*” [kp. Sc. R. 10 19 (72 g, 73 Rim. 2, kaj aliloke)], kaj por kiu W ü s t e r donas ankaŭ la sinonimon „*kompozitacoj*”, W ü s t e r (kaj F. & L.) ankaŭ donas la adjektivon „*kompozita*”, kiu rilatas al la familio de la „kompozitoj” aŭ al ĝiaj reprezentantoj.

Tial ŝajnas rekte malrekomendinde uzi la saman adjektivon kun senco alia, kiel tion proponis s-ro S l i j p e r ĉi tie. La solvo, tamen, ŝajnas ne facila. Ni intencis proponi la vorton „*kunmetita*” por anstataŭi la esprimon „*kompozita*” en la terminaro de s-ro S l i j p e r, kie ĝi troviĝas sur paĝoj 2, 9 kaj 19, rilate al *folioj* kaj *floraroj*. Sed sur p. 19, sub 73, troviĝas jena frazo: „*Miksaj floraroj, kompleksaj floraroj, diversmaniere kunmetitaj; ofte ili similas paniklon aŭ korimbon, kaj tiuokaze oni nomas ilin tiel.*” Por tiuj kiuj ne posedas numeron 37-an de Scienca Revuo, mi mencias ĉi tie de la s-ro S l i j p e r proponitajn terminojn kun „*kompozita*”: „*kompozita folio* [nome: *palm-kompozita, plumkompozita (nepare —, pare —, interrompita —, duoble —, malpliĝe —), palm-plum-kompozita*] kaj *kompozitaj (centripetaj) floraroj, nome regule kompozitaj floraroj (kompozita spiko; kompozita botro; kompozitaj floraroj (paniklo, korimbo, antelo).*

Ni petas fakulojn senprokraste sciigi sian opinion pri ĉi tiu afero, ĉar baldaŭ ĉi tiu terminaro aperos, korektita, kiel aparta broŝuro.

Skribu al W. P. Roelofs, Kerkpad zz 75, SOEST, Nederlando.